

LA PROGRESO

ĈEĤOSLOVAKA ORGANO ESPĚRANTISTA. ★ ĈESKOSLOVENSKÝ LIST ESPERANTSKÝ.

Aperas monate. Jara abono K 6.— (por 10 numeroj). — Redakcio: Plzeň, Radyňská ul. 10. —
Administrejo: Fr. Kavan, komercisto, Plzeň, Poděbradova tř. 6. — Konto de la Pošta ŝparkaso
no. 169.352. — Telefono: 732./VI. — La manuskriptojn oni ne resendas.

DRO STAN. KAMARYT:

INTERNACIA DANUBO.

Kiam komencos la novaj kaj la nove reorganizitaj ŝtatoj de la centra Eŭropo vivi nur per iom intensa vivo ekonomia, ne ekzistos pli grava rivero en Eŭropo ol Danubo. Ĝi estas la plej longa rivero en centra Eŭropo, sed laŭ signifo unusola kaj nesuperebla eĉ per la plej longa rivero de Eŭropo, Volgo.

Ĉar se oni povas nomi Volgon rivero rusa, Rhonon franca, Elbon kaj Rheinon germanaj, oni devas Danubon nomi rivero internacia. Tiu ĉi epiteto estas tute pravigita per ĝia estinteco. El ĝia plej alta punkto estas bona kaj facila kuniĝo kun Rheinlando kaj Francio, kiun uzadis la plej antikva estinto. Sur la plej norda punkto ĝi peras trans Regensburg kuniĝon kun centra Germanio, facilaj transirejoj al supera Moldavio kaj Moravo ebligas kuniĝon kun riveroj fluantaj en la Baltan Maron, la serbia Moravo formas vojon al la Maro Aegea, Saloniki kaj Konstantinoplo. Regionoj apud la suba Danubo malfermitaj kontraŭ Nigra Maro kaj sudrusaj prerioj allogadis batalemajn gentojn orientajn invitante ilin afable por kolonizaj vojaĝoj okcidenten ĝis Hungarion.

Sed se estis internacia la estinteco de Danubo, ĝia estonteco estos ankoraŭ pli internacia. Dum la mondmilito komencis sur ĝi formiĝi german-magiara hegemonio. Sed la rezultato de la milito redonis la riveron al ĝia internacia destino.

La Danubo estas longa 2000 km (Rheino 1250 km, Elbo 1200 km), estas navigtaŭga de Ulm, kaj ĝi fluas tra la germania teritorio ĝis Passaŭ (362 km),

DR. STAN. KAMARYT:

MEZINÁRODNÍ DUNAJ.

Až začnou nové a nově zorganizované státy střední Evropy žítí jen trochu plnějším hospodářským životem, nebude významnější řeky v Evropě nad Dunaj. Je to nejdelší řeka Evropy střední, významem však jedinečná a nepřekonatelná ani nejdelší řekou Evropy, Volhou.

Neboť lze-li nazvatí Volhu řekou ruskou, Rhonu francouzskou, Labe a Rýn německými, třeba Dunaj nazvatí řekou mezinárodní. Plně je oprávněn tento přívlastek její minulosti ... S jejího vrchoviška je dobré a snadné spojení s Porýním a Francií, jehož užívala nejdávnější minulost. Na nejsevernějším bodu sprostředkuje přes Řezno spojení se středním Němckem, snadné přechody k horní Vltavě a Morava umožňují spojení s řekami tekoucími k Baltickému moři, srbská Morava tvoří cestu k moři Egejskému, Solunu a Cařihradu. K Černému moři a jihoruským stepem otevřené kraje okolo dolního Dunaje vždy lákaly bojovné národy východní, zvuče je vlídně k osidlovacím cestám na západ, až do Uher.

Byla-li však mezinárodní minulost Dunaje, bude jeho budoucnost ještě mezinárodnější. Za vlády Rakouska a Německa začala se na něm tvořiti sice německomaďarská hegemonie, výsledek války však vrátil tuto významnou řeku jejímu mezinárodnímu poslání.

Dunaj měří 2000 km, (Rýn 1250 km, Labe 1200 km), je splavný od Ulmu, a bude protékat německým územím až k Pasovu

tra la aŭstria ĝis Theben (346 km), tra la bohemia ĝis Vyšehrad (145 km), poste tra la hungaria kaj serbia (entute 560 km, la lima punkto ne estas ĝis nun fiksita), poste el Belgrad ĝis Braila tra teritorio bulgaria kaj rumenia (980 km), kaj fine el Braila ĝis Sulina (173 km). Sekve la Danubo estos grava ekonomia vojo de sep novaj ŝtatoj, kuniganta ilin reciproke eĉ kun maro. Ĝian gravecon ni komprenos, se ni rememoros, ke eĉ en la estinta Aŭstrio oni transportis sur Danubo antaŭ la milito 21 milionojn q da havaĵo, dum la jaro, kaj en Hungario 47 milionojn q.

Sed por ke la Danubo povu efektive evolui en internacian vojon multigantan la ekonomian kulturon de siaj ŝtatoj, estas bezone, ke oni malebligu la revenon de la german-magiara hegemonio. Tion oni efektivigos per internacia aranĝo de la transporta regularo. Ĝin prizorgos kompreneble internacia komisiono laŭ modelo de la estinta komisiono en Galac, kiun dum la milito la centraj potencoj disigis. Ĝi estos nature komisiono de multe pli grava signifo ol la estinta, ĉar ĝia agopovo etendos sin je la tuta navigata ĝa fluo de Danubo.

Grava estas lingva problemo de tiu ĉi internacia institucio. Certe ne permesos ĝi junaj aŭ juniĝintaj ŝtatoj, ke la oficiala lingvo de la komisiono fariĝu la germana, protagonisto de nova hegemonio. Sed eĉ la franca lingvo ne taŭgas por tiu celo, ĉar neniu de la interesigantaj nacioj estas franca, kaj unu sola romana sed ne tro. Tial taŭgas kiel interkomprena lingvo de la komisiono sole esperanto. Tial estas bezone, ke oni komencu labori laŭ tiu direkto ĉe ĉiuj interesigantaj nacioj.

Ĉe Bohemoj jam la Bohema asocio esperantista sendis al ministerio de la eksterlandaj aferoj koncernen postulon. Similajn klarigojn faros certe esperantistoj eĉ en ĉiuj ceteraj ŝtatoj, kiuj estas interesataj je la internaciigo de Danubo.

(362 km), rakouským až k Drežinu (346 km), českým až k Vyšehradu (145 km), pak uherským a srbským (celkem 560 km, hraniční bod není dosud stanoven), potom z Bělehradu do Brailly, územím bulharským a rumunským (980 km), a konečně z Brailly do Suliny (173 km). Bude tedy Dunaj důležitou hospodářskou cestou sedmi nových států, cestou spojující je s mořem i mezi sebou. Její význam pochopíme, uvážíme-li, že i ve starém Rakousku činila doprava zboží po Dunaji před válkou ročně 21 milionů q a v Uhrách 47 milionů q.

Aby však mohl se Dunaj opravdu rozvinouti v mezinárodní cestu, zmnožující hospodářskou kulturu svých států, je třeba, aby byl znemožněn návrat německomaďarské hegemonie. To docílí se mezinárodní úpravou dopravního řádu. Nad ním ovšem bude bděti mezinárodní komise po způsobu bývalé komise v Galaci, již za války centrální mocnosti rozpustily. Bude to ovšem komise daleko většího významu než bývalá, neboť působnost její bude se vztahovati na celý splavný tok Dunaje.

Důležitá je jazyková otázka této mezinárodní instituce. Nepřipustí zajisté šest mladých nebo omlazených států, aby jednacím jazykem komise stala se němčina, protagonistka nové hegemonie. Ale ani francouzština se nehodí k tomu účelu, neboť žádný z národů interesovaných není francouzský, a jen jediný románský, a to ne mnoho. Proto hodí se za dorozumivací jazyk komise jen esperanto. Třeba proto, aby v tom směru byly u všech súčasných národů zahájeny kroky.

U Čechů už Svaz českých esperantistů podal ministerstvu zahraničních záležitostí příslušné podání. Podobné rozklady učiní zajisté esperantisté i ve všech ostatních státech, které jsou na zmezinárodnění Dunaje interesovány.

NI FOSU NIAN SULKON!

Feliĉe ni ĝisvivis la tempon, kiu permesos al ni plej libere propagandi ne nur la lingvon mem, sed ankaŭ ĝian noblan idealon. Ni havas ne nur la rajton, sed la devon fosi denove nian malzorgitan sulkon.

Kiel propagandi?

Eĉ ĉi tie ni povas citi la proverbon: »Diversaj vojoj celas Romon.« Ni uzu ĉion eblan, sed ni bone pripensu nian agadon, por ke ni ne ridigu la aferon. Fajron de la ekflamiĝinta junulo kaj tamen trankvilan seriozecon de la sperta maljunuleco ni portu en nia koro — kaj sole halti ni

ne volu. La mondo — kvankam skeptika kaj ne aljuĝanta nian ekzistadon — tuj ekvidas nian malprogreson kaj ekdubos pri nia venko.

Generale estas rekomendinda la presa propagando, kiu informas plej rapide la publikon. Ni uzu do kiel eble plej ofte la plumon kaj klopodu konvinki la redakciojn, sed ne nur tiujn de la konataj naciaj ĵurnaloj, sed ankaŭ la aliajn, nome la fakajn! Ŝajnas al mi, ke je tiuj ĉi lastaj ni forgesadas, kaj tamen ili estas ankaŭ legataj de la neesperanta publiko kaj ni povas en ili tre facile mencii la praktikan uzadon de Esperanto en tiu aŭ jena direktoj.

La oficiala organo de Asocio de ĉeĥaj instruistinoj »Časopis českých učitelek« enkondukis fine post mia senĉesa urĝado konstantan rubrikon pri Esperanto — kaj ĝi portas jam fruktojn — de multaj kolegiinoj kaj kolegoj mi estas petata pri informoj, konsiloj k. t. p.

Neniel volante fanfaroni, mi devas malkaŝi, ke ankaŭ la poresperanta rubriko en la ilustrita revuo »Rozkvět« siatempe, t. e. en militjaroj 1916—18 havigis al mi la devon (ofte ne agrablan, ĉar mia libera tempo estas tre limigita), forsendi en tiuj ĉi tri jaroj skribe pli ol 600 respondojn al la interesigintaj legantoj aŭ jam malnovaj esperantistoj, kiuj ie, eĉ sur la batal-kampo, legis la rubrikon kaj miris, ke »Esperanto ankoraŭ vivas!«

Bedaŭrinde, la redakcio de »Rozkvět« hezitas plu akcepti la esperantan rubrikon, mi ne volas pravigi la fakton, ke eĉ ĉi tie helpis la idistoj, sed mi opinias, ke mi tamen estas prava . . .

Do, ni ĉiuj informu nian gazetaron en tuta respubliko pri la vera stato. La »Rondeto de esperantistinoj en Praha« ĵus fondis, »apartan postenon« inter siaj komitatataj membroj, kiun prizorgas la revuistino. Ŝia devo estas informadi senĉese nian gazetaron kaj vere, ĝi ne okazas sensukcese.

Similan taskon havas la instruistoj aŭ instruantoj en la kursoj, kiuj lastatempe ĝojige multiĝas! Jen estas la ombro de niaj penoj, ni bezonas unu ekzamenan komision, kies ekzistado garantius al ni efektive esperantistajn instruistojn, tiel dire apostolojn de Esperanto, kiuj ne nur pro ideala, sed ankaŭ por praktika flanko ŝatas Esperanton.

Preskaŭ mi volus diri: oni multe instruas (—is) Esperanton ĉe ni kaj tamen oni malmulte instruas.

Estas konate — precipe en regiono, kie ĝis nun ne troviĝis samideanoj, ke oni volonte (pro kio?!) aliĝas al kurso de la nova lingvo, kiun la nova, kelkafoje tre nova »verdstelulo« aranĝas, ĉiuranga societo diligente kunvevas kaj pacience (almenaŭ dum komenco) aŭskultas kaj ripetas »Leono estas besto«, sed poste?

Kio okazas poste?

Ciam la sama, la vicoj maldensiĝas, do bone, iu estas kulpa, aŭ la instruanta fervorulo aŭ la lernanta novulo, sed tiuj, kiuj restis fidelaj ĝis la fino kaj demandas nun:

Pro kio ni lernis?

Tiujn kaj tiajn dividu, jes, dividu ilin, jen estas la

instruistoj — parolu al ili pri utila servo de reciproka korespondado inter fremdaj samprofesianoj, pri interŝanĝado de la lernejoj objektoj k. t. p.;

al komercistoj montru la rapidajn komercajn rilatojn kun la alilandaj firmoj, la gravecon de la esperanta korespondado;

al studentoj, al fervojistoj, kuracistoj, artistoj, k. t. p. al ĉiuj parolu pri la utilo de Esperanto en ilia speciala fako kaj intereso, ne forgesu montri al ili diversajn propagandilojn, sciigu ilin tuj, se vi legos en esperanta gazeto pri ia servo aŭ fakto, kiu kŝcernas ilian propran profesion aŭ intereson, faru tiel eĉ tiam, kiam ili ne plu vizitas vian rondon, konvinkigu ilin pri benata servo de Universala Esperanto Asocio (U. E. A.), fariĝu apostolo de esperanta lingvo, kiu tiamaniere estos vivanta kaj, ne nur ekzercita lingvo kaj tiun ĉi efektive malnovan kaj ofte ripetatan devon plenumu ĝoje, ĉar Esperanto kun siaj programoj kaj faktoj realigotaj, meritas esti subtenata!

Julie Šupichová.

LA SAĜULOJ.

(El »Z různých dob« de Alois Jirásek.)

Inter kampoj apud arbareto soleje vidiĝas jam multe pli longe ol cent jarojn malnova tranĉejo de kampa baterio, duone renversiginta kaj kovrita de arbustaro. Tute sola ĝi restis el ĉiuj tranĉeoj kaj remparoj, kiuj tie ĉi iam en longa strio etendiĝis tra la plataĵo kaŝante multenombrajn kanonojn prusajn, celumitajn kontraŭ la imperiestra armeo same ŝirmita de tranĉeoj. Nun ĝi similas al an-

tikva tombopiramido, sur kiu dum nebulaj matenoj kaj malvarmegaj vesperigoj la paŝtistoj ekbruligadas al si fajron kaj de sur kiu ili laŭtvokas malproksimen.

En la jaro 1778 dum la milito pro bavaria heredaĵo la tuta regiono laŭlonge de riveroj Metuje kaj supra Elbo loĝigante du armeojn similis al senmezura formikejo. La prusian armeon komandis Friedrich, en kontraŭo Jozefo II., ambaŭ filozofoj. Densa nebulo kiel profunda lago kovris la regionon; estis frumatene, silente, senbrue kvazaŭ nek soldateto estus estinta en proksimeco. Ĉie estis malpermesite sonorigi; sed anstataŭ sonorilo ekaŭdigis kanto de vira voĉo: »Kiu sub protekto de la Ĉiopova —«

Tiun ĉi kanton ekaŭdis Václav Suk, senranga soldato de imperiestra regimento de Hiller, starante malproksime je antaŭposteno sur la rando de herboriĉa valo. Densa arbustaro kaŝis lin duone. Ĉar estis malvarme, li eltiris ĝis la trikorna ĉapelo sian grizan mantelon, tiel ke oni ne vidis la harplekton. Jen tiu kanto — kaj kvazaŭ ĝuste vidalvide! Tie ja estas jam la malamikaro — kiel tio?

Kutime Suk preferis simplan kanton profanan en ĉeesto de kamaradoj apud la fajro aŭ antaŭ la tendo de kantinistino, tiun ĉi fojon tamen la diserva kanto lin kortuŝis. La avineto estis kantadinta ĝin ja hejme paŝante el ĉambro en provizejon, el tie ĝis subtegmato, kiam klakante per pantofletoj ŝi vekadis la tutan mastrumejon.

Suk komencis ankaŭ. La voĉo en kontraŭo ĉesis por momento, poste ĝi eksonis denove kaj tra la ondoj de la malrapide leviganta nebulo sonis la antikva kanto.

Sed Václav ne bridis longtempe sian scivolon. Tiu homo post la valo kantis solene pluen kiel en preĝejo kaj ŝajnis ke li volas finkanti tiujn versojn kiel fariĝis la avino de Suk.

»He, Vi tie, ĉu Vi estas soldato?«

Tiamaniere Suk komencis la interparolon kaj li ne parolis en surdan nebulon. Li eksciis, ke li interparolas kun soldato, prusia antaŭposteno.

»Nu, kiel tio, Vi estas Brandeburgiano kaj Vi parolas ĉeĥe?«

»Mi estas Ĉeĥo, el Kladsko apud la bohemia landlimo. Mi servas laŭ volo de Dio jam la duan jaron —«

»Li estas pia,« ekpensis Suk. »Certe helvetiano (protestanto),« kaj li esprimis laŭte sian supozon. La Prusiano jesis.

»Kaj kiel oni nomas Vin?«

»Jan Koláčny.«

»Sed ni tiel babilas, — kion al ni eble dirus niaj komandantoj —?!«

»Ĉu ni faras ion malbonan?«

»Certe ne, ni estas sampatrujanoj, ambaŭ Ĉeĥoj. Ĉu tio ofte okazas?«

La interparolo ekhaltis. Suk vidis tra la maldensiganta nebulo silueton de prusia soldato en pinta ĉako simila al la episkopa mitro. Li staris ĉe maljuna branĉlarĝa fago. Post momento Suk komencis: »Ho, kiel malvarme estas hodiaŭ!«

»Vere. Venu varmigi vin!« Kaj Koláčny diris tion tiel sincere, kvazaŭ li starus sur la sojlo de sia de neĝo kovrita kabano en montaro.

»Kien?«

»Ĉi tien al mi Mi havas plenan botelon —«

Suk ekembarasiĝis. Malkonfido ekvekiĝis. Eble ke ia ruzo — kaj krom tio — forlasi la postenon! Koláčny ekkomprenis lin.

»Ne timu, mia amiko! Ĉu mi kuraĝus fari maljustaĵon al Vi. Ni formetu la armilon kaj ambaŭ ni iru renkonte ĝis duono de vojo!« — Tiu ĉi voĉo ne trompis kaj Suk vidis, kiel Koláčny apogas la pafilon sur trunko. Li rigardis returnen kaj iris. En duono de vojo ambaŭ soldatoj renkontiĝis. La prusia malamiko donis kun senafekta sincereco la manon.

Venu nur kaj ne timu, ni ja estas farintaj al ni nenion malbonan, ni estas fratoj, sangoparencoj! Ĉu koncernas nin kiel ofendis sin la monarĥoj?« diris la protestanto, biblioleganto, posteulo de elmigrintaj Fratoj de Unueco kaj la gaja junulo el bohemia reĝlando komprenis lin.

Kiel tiuj ĉi meditis, tiel certe estis pripensintaj antaŭ ili multaj homoj, kaj oni medites ĉiam, se la reĝoj filozofados aŭ la filozofoj redagos.

»Kaj tie ĉi finiĝis tio,« aldonis la maljuna najbaro, kiu rakontis al mi tiun okazintaĵon laŭ delongtempaj memuaroj kaj montris al mi la dezertiĝintan tranĉeon, kie ni ripozis. »Anbaŭ rezonemuloj absorbiĝis de la interparolo kaj oni kaptis ilin. Tie ĉi sidis la prusia reĝo kaj tien ĉi oni alekortis la soldaton Koláčny por juĝi lin. Li rakontis ĉion kaj post momento oni pafekzekutis lin tie post la remparo. La dua evitis la plumbon kaj pulvon, li tamen subiris la vergopuncn kaj Dio scias, kie li elsuferis la reston de puno!«

Vere, kiom valoras la militistaro, kiu rezonadas kaj meditas.

(El ĉeĥa lingvo tradukio R. F.)

MILITA VIZITO.

Nur nun mi povas rakonti pri la esperantista vizito, kiu tre ĝojigis 3 simplajn esperantistojn antaŭ kvar jaroj.

En komenco de la jaro 1915 venis en Praha la konata esperantisto Edm. Privat el Genève. Li estis veninta el Karpatoj, kie tiam staris Rusoj, kaj kien li estis per multaj oficoj enlasita kiel fremda jurnalistino.

Tiam oni vivis jam tre malgaje en Bohemio. Ne estis ankoraŭ malsato, sed estis terura polica reĝimo kaj malpermeso de ĉiuj fremdaj informoj kaj ni ĉiuj tiel sopiris je iaj informoj. Ĉar eĉ por la plej kuraĝaj venadis iam momentoj de malespero.

Do la Sviso venis. La unua li alportis sciigon pri la batalo sur Marno. Tiam ankoraŭ preskaŭ neniu sciis pri la graveco de tiu ĉi batalo.

Kaj multajn aliajn informojn li donis al ni. Li restis en Praha 8 horojn kaj forveturis ne loĝinte en hotelo. Ni vizitis kun li redak-

cion de Národní Listy, kie nin akceptis nuna financa ministro d-ro A. Rašín.

Post lia alveno Genévon publikigis Journal de Genève ĉefartikolon pri la bohema problemo, kiu ĝin tre bone traktis laŭ niaj informoj.

Nun mi rememoras la pasinton kaj premas en spirito la manon de sinjoro Privat. La milito finiĝas kaj niaj revoj povas ekrealiĝi denove.

D-ro. Stan. Kamaryt

UNIVERSALA KORA NOBELECO.

Internacia ligo de progresemaj homoj.

La lan de marto okazis en Centra Oficejo de U. K. N. en Plánice, Bohemio la kontrolo de l' voĉdoniloj ĝis tiu tago alvenintaj. Aĵoj de Centra Komitato estas elektitaj: Deleĝitoj: Em. Batěk, ekslernejestro, Ričany ĉe Praha, Bohemio, Dro. Oldřich Krupař, kuracisto, Žiželice s/Cidl., Bohemio, Leop. Kronenberg, profesoro, Orlova, Silezio, Marie Kubásková, 12. Lobežská ul., Plzeň 5. Bohemio, Ant. F. Müller, 20. Wasserg., Wien 3., Aŭstrio, Dro. Wolf. Pezler, Holic ĉe Olomouc, Moravio, Jan Kaszyski, direktoro, Grzegorzki, Krakov, Galicio, Alfred Siebenschin, jur. et. phil., 157. Lichtensteinstr. II./29. Wien IX./4. Aŭstrio, Dro. Wölg. Pezler, eksjuĝisto, 8. Zillnerstr., Salzburg, Aŭstrio, Jaro Zelezny, pastro, Plánice, Bohemio. Vickomitanoj Deleĝitoj: Jan Hlaváč, oficisto de horloĝfabriko, Ebensee, Aŭstrio, Hans Erb, komercisto Itingen (Bassel) Svisio, Em. Kořtář, maŝinisto, Heřmanice, poŝto Pohl, Moravio.

Nun estas la komitatmembroj petataj el sia mezo elekti prezidanton kaj vicprezidanton. La voĉdoniloj estu sendataj refoje al C. Of. Direktoro de C. O. dankas al ĉiuj samcelanoj, kiuj partoprenis la baloton de l'komitato. La Deleĝitoj estas petataj prezenti en Esperanto-kursoj la »Deklaracion pri Kora Nobelego« kaj tiel kun Esperanto propagandi ankaŭ ĝian internan ideon. Dek ekzempleroj 40 heleroj aŭfranke. Novaj samcelanoj Dro. Marek Druks, Grosse Pfarrgasse 6./14., Wien II., Aŭstrio. R. A. Čech, D'Orsayg. 7./23., Wien IX./1. Aŭstrio. Rudolf Dostál, fervoja revidento, Břeclav, Moravio. Ant. Hrabálek, leteristo, Břeclav, Moravio. Jos. Sedláček, dobrov. I. morav. dělobit., Břeclav, Moravio. A. Horák, ĉefkontroloro, Hodolany, ĉe Olomouc, Moravio.

ĈEĤOSLOVAKIO.

La ĉeĥa akademio de sciencoj kaj artoj respondis al la memorskribo de la magiara akademio, per kiu tiu ĉi petis ĉiujn universitatojn kaj akademiojn de la civilizita mondo protesti kontraŭ la maljustaj farataj kontraŭ la magiara nacio per la nacioj apudaj precipe la ĉeĥa. La ĉeĥa akademio respondis en simpla, digna maniero dissendante laŭ la samaj adresoj la laŭveran prisribon de la tendencoj de ĉia nacio, en kiu ĝi provas, kiu estis la subpremanto kaj la subpremato. La akademio eldonis ankaŭ esperantan tradukon de sia respondo. Ĉiuj niaj legantoj povas ĝin senpage ricevi de la redakcio de

la Progreso aŭ de sro Josef Eiselt en Praha Vinohrady, Slezská 58. Ni petas ĉiujn niajn fremdlandajn legantojn, ke ili sendigu al si tiun gravan dokumenton kaj raportu pri ĝi en ĵurnaloj de sia lando.

* DIVERSAĴOJ. *

Deka Brita esperantista kongreso okazos dum Pentekosta semajno (6.—10 jun.) en Liverpool. Tiu ĉi urbo estas laŭ sia grandeco dua en Britio kaj unu el plej gravaj havenurboj de la mondo kaj prezentas multajn interesajn al fremdulo. Kongresa legitimacio kostas 3 ŝil. 6 p. Informojn donas (en Ĉeĥoslovakio oni uzu la servojn de U. E. A.) Hon. Sekr. J. D. Applebaum, 11. Mayville Rd., Mossley Hill, Liverpool.

Esperanto kaj socialistoj. En Francio fondiĝis Esper. sekcio de la socialista partio, kiu celas propagandi Esp. inter socialistoj. Ĝi aperigos en francaj soc. gazetoj ĉiujn gravajn dokumentojn pri socialista movado, kiujn ĝi ricevos de alinaciaj sampartianoj. Adreso de sekretario estas: Marcel Stelano, 26, rue Milton, Paris IX.

Esperanto en la komerco. Laŭ la Brita ekzemplo fondiĝis en Japanio Komitato por komuna lingvo komerco, kiu propagandas Esp. inter komercistaro kaj helpas al ĝi per Esp. diskonigi japanajn komercaĵojn. — En belga urbo Gand fondiĝis entreprenado »Pro Belgica«, kiu helpas restarigi belgajn komercon kaj industrion. Al komercistoj kaj industriistoj ĝi havigas per Esp. diversajn informojn kaj interligas ilin kun eksterlandaj kolegoj, kiuj volas komerce rilati kun belgaj firmoj. Informojn donas ĝia direktoro so. Henry Petiaŭ, 60, Boulevard St. Liévin, Gand.

Hungara Revuo estas le nomo de le gazeto, kiun eldonas magiaraj esp. en Budapeŝt. Ili klopodas diskonigi per ĝi la tendencojn de sia nacio. Per tiu celo ĝi enpresas esp. tradukojn de ĉefaj enlandaj gazetoj. Estas kompreneble ke multaj estas kaj estos direktaj kontraŭ nacio bohema Ĝia adreso: Budapeŝt IV., Kammermazer Károly u. 3.

Universala Esperanto-Asocio eldonos dum printempo adresaron de siaj deleĝitoj, kiu estos senpage sendite al ĉiuj membroj pagintaj la kotizaĵon por la jaro 1919. — En multaj lokoj, kie troviĝas esperantistoj, la U. E. A. ne estas ankoraŭ reprezentata. Esp. societoj proponu tuj taŭgan personon por la posteno de la deleĝito. En la lokoj, kie ne estas esp. societo aliĝu izolitaj esperantistoj. — Ni varme rekomendas al ĉiu nia leganto aliĝi al U. E. A., kiu pro sia granda laboro meritas subtenon de ĉiu esperantisto. Adreso de ĝia centra oficejo: 10. rue de la Bourse, Genève, Svisio.

Universo (München S. 50, Dietsamszellestr. 10./2.) plifaciligas interrilatojn de korespondantoj kaj kolektantoj de poŝtmarkoj, kartoj k. t. p. Kotizaĵo kaj abono de la »Mondkorespondado« 4 Sm.

Miksaje. So. Jul. Boschan, vicprezidanto de la germana esp. societo »Verda Stelo« en

Praha sendis al ni 10.— K por subteni la intencon eldonadi reliefe presitan esp. aldonon al la bohema porblindula gazeto »Zora«, kiun oni eldonos por honorigi la memoron de blinda ĉeĥa heroo Johano Žižka el Trocnov. Speciale ni notas ĉi tiun sendon, ĉar so B. estas Germano, kaj sekve per tiu ĉi ago li montris sian koron de vera esperantisto. — La sukcesoj de Esperanto en Bohemio ne lasas travile dormi nian idistan kvaron. En la ĝis nun ne informitaj gazetoj ili enpresas sciigojn mirinde trompigajn. Jen ekzemplo: »Ĉeĥa federacio de amikoj de la lingvo internacia donas informojn pri la mondlingvo. Turnu Vin al k. t. p.« Sinjoroj karaj, agu honeste, propagandu klare Idon sed ankaŭ nenian kunigu ĝin kun la nomo de nia Esperanto. — Nova esperanta rubriko troviĝas en »Časopis českých učitelek« en Časlav. Ĝin gvidas nia senlaca amikino Fina Šupichová kaj ĉiutage alvenantaj informopetoj pravas ĝian utilecon.

Edziĝo. So. Otto Sklenčka, bankoficisto en Hradec Král. deligito de U. E. A. edziĝis kun Fina. Božka Dolanská. — Ni esprimas al ili koran deziron de konstanta feliĉo en la nova vivo.

KRONIKO.

Praha. »Rondeto de esperantistinoj« aranĝis 8. III. sian unuan amuzan vespereton, kiun vizitis 67 personoj, inter ili la esperantistoj el Příbram, Plzeň, Ouhaly, Liberec kaj Frýdland. La programo konsistis el parolado »Pri esperantismo« (prez. J. Šupichová), recitado el »Hamlet« (sekr. S. Dlouhá), monologo (rev. L. Dandová), melodramo »Venĝo de floroj« (trad. So. M. Lukáš, deklamis instr. K. Hlaváčová), Kanto de Závši (bibl. J. Čiškovská) kaj kelkaj horaj kantoj. Je fino tre interese rakontis »Pri praktika uzado de Esperanto« franca legiano So JUC. J. Friedrich. Poste oni disponis al la ĉeestintoj »liberan tribunon«. kiun uzis So kons. J. Eiselt, por diri kelke da vortoj »Pri kunigo de ambaŭ Prahaj societoj« kaj fno. A. Příhoda, germana samideanino el Liberec. La vespero estis vere »samideana« kaj ĉiuj membroj de la »Rondeto«, kiu estas la unua esperantista grupo, fondita en nia respubliko, povas ĝoji el ĝia sukceso. La aranĝita monkeleto »por orfoj de falintaj legianoj« atingis K 87.—

Pri Esp. antaŭ, dum kaj post la milito paroladis so. prof. Pitlík la 22. marton en la Bohem-hebrea rondeto. Post li parolis pri signifo de Esp. so. Weiner, redaktoro de »Tribuna«. La parolantojn oni aŭskultis kun granda atentemo kaj multaj el la 60 partoprenintoj ĉeestis esp. kurson.

Plzeň. La 19 de marto okazis komitata kunveno de la Esperantista klubo, kiu decidis eldonadi »Bibliotekon de La Progreso«. En ĝi aperos 1. Vortaro esp. bohema (en presado). 2. Vortaro boh.-esperanta. 3. Esp. Lernolibro por Bohemoj. 4. Kio povas okazi« teatraĵo de Dro. Schulhof k. a. — Societo de komercaj helpantoj aranĝos kurson de Esperanto. Kotizaĵo 10 K. Instruos so. J. Pech.

Hradec Král. La 18. de marto komencis esp. kurso gvidata de so. O. Sklenčka, kiun partoprenas 48 gesinjoroj.

Hodolany ap. Olomouc. La kurson aranĝitan de so. ĉefkontroloro A. Horák partoprenis 56 personoj. La 12 de marto oni tie fondis Esp. rondeton, kiu kunvenas en hotelo de A. Jahoda, Nové Hodolany, Komitato estas jena: ŝtaciestro insp. V. Uhlíř, (prezid.) A. Harna, (vicprez.), A. Hatel, (sekret.), f-ino. A. Bučáková (vicsekret.), soj. Svoboda, Sehnal kaj f-inoj. M. Bučáková kaj Tesařová (komitatanoj).

Mcravany apud Pardubice. La 25. marton okazis ĉi tie parolado pri Esp. aranĝita de Boh. Esp. Servo. Al la aranĝota kurso aliĝis 20 personoj, ĉefe el la Sokola gejunularo. — En la stacidomo oni elpendis esp. hortabelon apud la stacidoma kaso.

Vyškov (Moravió). La 15. marton paroladis f-ino Janalíková en geinstruista kunveno.

Kroměříž (Moravio). Parolado de f-ino Janalíková okazis tie ĉi la 16. marton.

Osek u Rokycan. Laborista gymnast. soc. aranĝas kurson de Esp., kiu komenciĝis la 22. marton per parolado de lerneja direktoro so. Aŭg. Strnad pri la bezono de komuna internacia lingvo. Partoprenas 70 personoj. Iniciatinto de tiu ĉi kurso estas so. V. Aŭbrecht, reveninta el la rusa kaptiteco, lernanto de so. lern. dir. Em. Batěk el Říčany. Instruas so. J. Pech el Plzeň, kies fervoro estas admirinda, se oni konsideras, ke li devas nokte, marŝante pli ol unu horon, reveni al la stacidomo en Rokycany.

German-Aŭstrio.

Viene. Esp. societo »Danubio« festis la 9. de marto malfermon de sia hejmo en la urba horloĝmuzeo (Wien I., Schulhof 2., II.) En la sama salono konferencis la 27. de februaro prezidantoj de la vienaj esp. societoj pri eldono de Aŭstria esp. gazeto kaj pri la memorando pri enkonduko de Esp. en Aŭstriajn lernejojn, kiu estos prezentota el la ŝtata sekretario por instruado. — Instruista societo »Esp. kurso« kunvokis vian instruistaron la 23. kaj 30. de marto en la novan komercan akademion por preparoli la proponon pri enkonduko de Esp. en lernejojn. Ĉefa parolanto estis sa dir. Schamanek.

Graz. Post preskaŭ kvinjara interrompo Stiria Esperantista Societo rekomencas vigan agadon. La anoj kunvenas ĉiusabate en restoracio Winterbierhaus, I., Bürgergasse. Oni remalfermis ankaŭ la Esperanto-Oficejon, kiu troviĝas VI., Schönaugasse 6/2.

Marburg. La anoj de Loka grupo de Stiria Esperant. Societo, parte germanoj, parte slovenoj, dum la milito fervore propagandis kaj diligente studis Esperanton sub gvidado de la prezidanto sro. Haas.

KRAMAĤ:

En la vivo de la nacioj ni travivas nian eternan vivon, en la dankema rememoro de tiuj, kiuj vivos post ni, kaj tio estas ankaŭ la plej bona rekompenco por ĉio, kion bonaj kaj utilan ni faros por estonteco de la nacio. Trad. »Rondeto de esperantistinoj en Praha.«

LETERO.

Satinda redakcio,
la membroj de la Vienna esp. societo »Danubio« festante la malfermon de sia Esperanto-hejmo en la urba horlogmuzeo, sendas per Via gazeto korajn salutojn al la ĉeĥoslovakaj samideanoj.

Rud. Kaftan, prezid., R. A. Ĉech, sekret., Otto Simon, J. Schamanek, Illing, Siebenschlein. (Multaj aliaj subskriboj.)

Ni kore recipokas ĉi tiun saluton de niaj vienaj samideanoj dezirante al ili ĉiam nur sukcesojn en ilia prosperanta klopodo.

La Progreso.

J. ŠUPICHOVÁ:

ANGULETO POR KOMENCANTOJ.

6a fragmento (el »Verkaro de Zamenhof«).

El parolado de Dro L. L. Zamenhof en VI. kongreso de Washington 1910:

»... La celo, por kiu ni laboras, povas esti atingita per du vojoj; aŭ per laborado de homoj privataj, t. e. de la popolaj amasoj, aŭ per dekreto de la registaroj. Plej kredeble nia afero estos atingita per la vojo unua, ĉar al tia afero, kiel nia, la registaroj venas kun sia sankcio kaj helpo ordinare nur tiam, kiam ĉio estas jam tute preta. Kia devas esti la karaktero de la unua vojo, pri tio neniu povas dubi; pri afero, kies tuta esenco kaj vivo estas bazita sur interkonsento, ĉiu komprenas tre bone, ke laborado de amasoj povas ĝin konduki al celo nur tiam, se ĉiuj laboras unu-anime. En tia afero, se ĝi per si mem montriĝis vivopova, konkordo estas la plej certa garantio de senduba sukceso, malkonkordo signifas la morton...«

Traduko de frazoj:

1. Ni volu atingi nian celon kaj ni ne timu malhelpon. — 2. Nur per komuna kaj konkur-

da laboro ni venkos. — 3. Kritikante la aliajn, ni demandu nin mem, kion ni faris? — 4. Ni klopodu ĉiueble, por ke nia movada potenĉiĝu. — 5. Neniam ni dubu pri la signifo de la propaganda laboro. — 6. Laborante por Esperanto, ni plibonigas nian sorton kaj sorton de la venontaj.

Prelozte:

La knaboj kaj la pomo. Knabo trovis sub arbo pomon. Li levis ĝin kaj pensis: »La pomo apartenas al mi. Mia patro semis kaj plantis la arbon. Li sterkis la radikojn kaj ordigis la branĉojn. Do estas juste, ke la pomo apartenas al mi.«

Venis alia knabo. Li ne portis simplajn tolaĵn vestojn, kiel la unua, sed li surhavis purpuran mantelon kaj oran kroneton. Li prenis la pomon el la mano de la laboristido kaj diris: »Duono da pomo apartenas al mi. La kampoj kaj ĉio, kio sur ili kreskas, estas posedaĵoj de mia patro, ĉar li estas reĝo. Estas do juste, ke la duono estas mia.« (Pokraĉ.)

Semi = sfti; planti = sázetí, vysazovati; sterki = mrviti; justa = správný; tolo = plátino; ido = potomek, mládě; posedi = míti (co)

Esperantisté objednejte si úplné ročníky časopisu

Český Esperantista

ĉis. IV. a V., než-li budou rozebrány. Jest jich již málo na skladě!

Obj. ročníky jsou cenným přehledem esperanta v Čechách na počátku nynějšího decenia. obsahují lehčí články esperantské, psané bezvadným esperantem a jsou nejlepší pomůckou těm, kdož v řeči té se chtějí zdokonalovati.

Ročníky à K 3.— (poštou K 3.80) posílá

JAN IGLAUER, PRAHA II., 1776.

Se vi deziras havi bonegan internacian gazeton,
abonu :

»**ESPERANTO**«

OFICIALA ORGANO DE UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO.
MONATA GAZETO REDAKTATA TUTE EN ESPERANTO.

16—20 paĝoj de plej bona teksto.

En havo: Artikoloj de ĝenerala intereso pri internaciaj problemoj, socialaj demandoj, geografio, ekonomio, scienco. — Literaturajoj. — Esperantismo. — Kroniko. — Tra la gazetaro. — Tra la libraro. — Lingvaj studoj. — Anoncetoj.

Jara abono: 12 kronoj, Luksa eldono: 14 kronoj, pageblaj al administr. de »La Progreso« en Plzeň, aŭ Sro. Dro. Sós, Tuchlaubøn 18., Wien.

Senpaga **specimeno** laŭ peto de la administrejo:

10. rue de la Bourse, Genève (Svisio).

Portu la stelon Ĉiu esperantisto

ĉar ĝi estas devo de ĉiu Esperantisto!
Aĉetu ĝin ĉe

BOHEMA ESPERANTO-SERVO
Moravany, Bohemio.

1 peco 2 K, poŝte K 2.40; 10 pecoj K 18.—,
100 pecoj K 160.— afrank.

sendu sian precizan adreson por

Adresaro de la esperantistoj

al

BOHEMA ESPERANTO-SERVO
Moravany, Bohemio.

T. & A. BAŤA

ŝuofabriko kaj ledotanejo
ZLÍN-PARDUBICE.

Propraj vendejoj:

Praha, Václavské náměstí 32
Brno, Koblížná ulice 24.
Opava (Troppau), Hrnčířská 14
Wien (Videň), Taborstrasse 17 a
Kraków, Szewska 22

Czernówitz, Rathausstrasse 4
Lwów, Akademicka 5
Łódź, Piotrkowska 74
Bratislava (Presburg), Michalovská 5
Przemysł, Franciskanska 25.

Zlín, náměstí 60.
Mor. Ostrava, nám. 14.
Znojmo, Kovářská 7.
Kroměříž, Komenského
nám. 107.
Přerov, Ferdinand. 15
Šumperk, nám. 27/28
Hodonín, Masarykovo
18
Olomouc, Kinopasáž
Val. Meziříčí, náměstí
Břeclava, Frant. Jos. 17
Nový Jičín, obch. dům
Jedek
Hranice, náměstí
Vyškov, Pánská 10
Svitava, Brněnská 4
Jihlava, Schillerova 5
Uherský Brod, náměstí
163

Kyjov, Komensk. lř. 4
Místek, náměstí 13
Vsetín, Dolní nám. 304
Kojetín, Masarykovo
náměstí
Křnov, Fr. Jos. nám. 12
Frýdek, náměstí
Trenčín, nám., budova
gymn. Písr.
Malacka, Slovensko
Trnava, Hosp. banka
Žilina (Zsolna), Sze-
chenji 209
Nitra, Slovensko
Růžomberok, Slovensko
Užhorod (Kežmark)
Lučenec (Luczivna)
Nové Zámky
Báňská Bystřice
(Besztercebánya)

Košice (Kassa)
Líberce, (Reichenberg),
Schückerstrasse 34
Pardubice, budova
spořitelny
Kolín, náměstí 72
Ústí n./L. (Aussig a./E.)
náměstí 28
Hradec Králové, Palác
Zál. a úvěr. ústavu
Ml. Boleslav, Pražská
ul. 116/1
Jaroměř, Husova tř. 91
Jičín, Velké nám. 60
Čáslav, Palackého 63
Dvůr Králové, nám. 57
Německý Brod, Komen-
ského 153
Turnov, Palackého 145
Plzeň, Zbrojnická 3

Čes. Budějovice, Šter-
nekova 18
Kladno, Královská 38.
Jindř. Hradec, Palac-
kého 94
Příbram, náměstí 142
Tábor, Třída Čes.-sl.
legií 640
Písek, Riegrovo n. 26
Louny, Žižkova 305
Náchod, Pražská 63
Klatovy, nám. 170/1.
Karlovy Vary (Karls-
bad), Fr. Jos. tř. 607
Most (Brüx), nám. 82
Amstetten, Viehdor-
ferstrasse 4
Wner, Neustadt (Vid.
Nové Město), Kaiser
Wilhelmstr. 64

Esperantia entrepreno. — Oni parolas kaj korespondas esperante.

Eldonanto: Esperantista klubo en Plzeň. — Responda redaktoro: B. Tittl, Plzeň, Radyňská ul.
Presis: Laborista presejo, Plzeň.